

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Seminarioj
pri lingva
demokratio**



**Al eldona
kaj regiona
kunlaboro
kun Unesko**



**Intervjuoj:
Trevor Steele,
Ilona Koutny**



La rajto al lingvo propra

Vi trovos...

213 Influo n-ro 18

Asahi, Le Monde:
kiel aperi?

Ago-Tago:
mobilize aŭ rutine?



216

Literaturo

Verkado iĝis dolĉa
narkotaĵo

Intervjuo kun Trevor Steele



217 RECENZOJ

Gerrit Berveling pri
Homaj rajtoj: deman-
doj kaj respondoj
Osmo Buller pri
Interparolo en la
fruktĝardeno...



218 Lingvopolitiko

Al demokrata alternativo

Marc van Oostendorp

205 Malferme

En reciprokaj rilatoj

Osmo Buller

206 KIAJN LINGVAJN RAJTOJN?

Manuel de Seabra

"Estas la horo ke ni,
esperantistoj, diskutu
pri tio laŭ vere
homarana vidpunkto."



208 Junularo

Krokodili: ne plu tabuo?


Saskia Idzerda

209

Eksteraj rilatoj

Grimpendaj etaĝoj
ĉe Unesko

Osmo Buller



210 KONGRESA KOMUNIKO 2

211 Intervjuo kun Ilona Koutny

Duoble pravi
sian valoron



212 Historio

Lemaire, la belga Kabe

Wim M.A. De Smet

Kaj plue...

218 PERSONE

219 LASTE APERIS, FOLIUME

220 NEKROLOGOJ

OFICIALA INFORMILO

221 ANONCETOJ

LOKE

222 ESPERANTO EN

RADIO

223 INDEKSO 1998

La kovrilo: Kalaŝ-etna patrino kun infano el Pakistano. (Corel Photos)

Malferme: Pordega detalo de la jesuita misiejo San Ignacio Mini, Misiones, Argentino. (F.L. Veuthey)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefaksa: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo:
Pasquale Zapelli.



EN RECIPROKAJ RILATOJ

Kiam Unesko renovigis la rilatojn kun UEA, Federico Mayor pravigis tion i.a. per la graveco de la informretoj de UEA por “disvastigi la mesaĝon de Unesko kaj antaŭenigi ĝiajn idealojn”.

Ni mem foje prenas niajn rilatojn kun UN, Unesko k.a. tro unuflanke. Ni emas pensi ke ili gravas nur por povi pledi por nia propra afero sur tiuj forumoj, por atingi decidojn favore al Esperanto kiujn la ŝtatoj devus sekvi. Tamen, la internaciaj instancoj ekrilatis kun ni ne por inviti nin persvadi ilin por Esperanto. Same kiel ni, ankaŭ ili deziras profiti de la rilato.

Kiel Mark Fettes skribis ĉi-rubrike (jul.-aŭg., p. 121), ni devas partopreni la oficialajn forumojn por aŭdigi nian voĉon en la diskutoj pri paco, homaj rajtoj, kulturo kaj evoluigo k.a. problemoj de nia tempo. Por havi ion por diri pri tiuj problemoj, ni devas diskuti pri ili ankaŭ sur niaj propraj forumoj.

Nia plej grava forumo, la Universala Kongreso, de longe estas tia diskutejo, kaj ĝia temo ofte ligiĝas al tiu de speciala jaro aŭ jardeko de UN aŭ Unesko. Niaj revuoj ĉerpas materialojn de ili, precipe de Unesko; *Kontakto* faras tion en preskaŭ ĉiu numero. UEA jam frue konsciis ke Unesko atendas konkretajn agojn de UEA. Tiel ekestis la serio Oriento-Okcidento, nia plej longedaŭra (ekde 1961) kontribuo al programo de Unesko.

Domaĝe, ni ofte forgesis raporti ekz. al Unesko ke ni “disvastigis ĝian mesaĝon”, pro kio ni preskaŭ perdis nian statuson. El tiu leciono ni espreble lernis. Nun nia plej malforta ĉenero estas la landaj asocioj. Tro malmultaj el ili respondis al la ripetaj alvokoj kontakti la UN-asociion aŭ Unesko-komisionon de sia lando. La plej multaj landaj asocioj verŝajne eĉ ne diskutis pri tio en sia estraro. Estas bedaŭrinde sed vere: sur multaj kampoj la klopodoj puŝi landajn asociojn similas predikadon al surduloj. Tio devas ŝanĝiĝi.

Lastatempe UEA eldonis tri librojn de Unesko pri temoj kiuj devus nin daŭre okupi. *Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj*, estas nepra manlibro pri la “esenca kondiĉo” de nia laboro, kiel la Statuto de UEA nomas la respekton al la homaj rajtoj. La du aliaj libroj (*Kulturo kaj evoluo*, *Kulturo kaj teknologio*) donas bazojn, krom por ĝenerala memklerigo, ankaŭ por nia Statuta celo disvolvi “komprenon kaj estimon por aliaj popoloj”.

Tiujn librojn oni devus donaci al sia Unesko-komisiono aŭ -klubo. Kaj eĉ se oni mem kredas scii jam ĉion pri iliaj temoj, necesas tamen legi ilin, por ke, parolante pri ideoj plej malsamaj, ni ĉiuj tamen nomu samajn aferojn per samaj vortoj.

Osmo Buller

Pri la Deklaracio de Homaj Rajtoj ĉio estas klara. Temas pri konata kaj oficiala deklaracio aprobita en 1948, kiu prologe esprimas “firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj” kaj en la dua artikolo proklamas ke “ĉiuj rajtoj kaj liberecoj [...] validas same por ĉiuj homoj” sendepende de “raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato”.

Sed oni povos — kaj devos — demandi: tamen, kiaj estas la lingvaj rajtoj? Japana Esperanto-Instituto proponas (vd. okt., p. 172) la lingvajn rajtojn establitajn en la t.n. Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj, aprobita en junio 1996 en Barcelono dum konferenco organizita de grupo de PEN-centroj kaj de diversaj neregistaraj organizoj. Unesko donis al la konferenco “moralan kaj teknikan apogon”, kaj post la aprobo de la Deklaracio (plue citota kiel DB, Deklaracio de Barcelono), Kataluna PEN-Centro liveris ĝin al la Ĝenerala Direktoro de Unesko cele al oficiala aprobo, por ke ĝi trovu lokon flanke de la Deklaracio de Homaj Rajtoj. Tiu aprobo neniam okazis.

Persone, de la unua momento, mi estis kontraŭ tiu deklaracio, kiu miaopinie enhavas kelkajn tre gravajn kaj danĝerajn erarojn. La ĉefa eraro: ĝi ne estas universala sed obeas strikte okcident-eŭropan vidpunkton. Ĝi ne entute aplikiĝas eĉ al orient-eŭropaj situacioj kaj estus tute absurda en aliaj kontinentoj.

Lingvo kaj teritorio

Ĉiamaniere, eĉ kun ĉiuj siaj eraroj, DB estas la ĝis nun plej ampleksa enprofundiĝo en la problemon de la lingvaj rajtoj, kaj ĝi tre utilas kiel elirpunkto al meditado kaj diskutado pri la temo. Laŭ mi, la ĉefa problemo ĉe DB estas ke ĝi asocias lingvon kun teritorio. Ĝi parolas pri lingvoj “propraj al” teritorioj, eĉ pri “kompara historieco” (Art. 2,2), rilate al la alvendato de diversaj lingvaj grupoj al iu teritorio, aŭ — en komento por la leganto — pri “establo de skalo da rajtoj por la lingvaj grupoj kun mal-samaj historiecoj”.



La Deklaracio de Homaj Rajtoj 50-jariĝas ĉi-monate.

Omaĝante al la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (subskribita la 10-an de dec. 1948), esperantistoj ne povas ne pensi ankaŭ pri la lingvaj rajtoj.



Kiajn lingva

DB konsideras, do, ke la teritorio estas propraĵo de la parolantoj de la lingvo plej longe ekzistinta en iu teritorio. Tio povus krei tre gravajn problemojn, ĉar preskaŭ ĉie la loĝantaro parolas pli ol unu lingvon. (Eĉ en okcidenta Eŭropo. Fakte, la solaj eŭropaj ŝtatoj kie nacio, lingvo kaj teritorio absolute koincidas, estas Portugalio kaj Islando.) En aliaj mondopartoj, la afero aspektas pli komplike. Ekzemple, en miloj (ĉu dekmiloj?) da vilaĝoj de Barato oni parolas kvar aŭ kvin lingvojn, kaj la parolantoj de neniu el ili posedas la teritorion. En kelkaj afrikaj ŝtatoj pli ol cent lingvoj estas parolataj: kiu estu la oficiala lingvo en tia lando, kaj kiujn rajtojn devus havi ĉiuj tieaj lingvoj? Aliaj landoj posedas pli ol unu lingvon, kaj ĉiuj estas al ili karaj. Skotlando (Alba¹), ekzemple, egale amas la oldan gaelan, la skotan lingvon de McDiarmid², kaj ankaŭ ne


“Elradikigi nian lingvon tute”

El la sama kataluna medio, lingvorajte tre konscia, nutriĝis la Esperanta poeto Abel Montagut, partopreninta la Barcelonan konferencon kiel membro de Kataluna PEN-Centro. Montagut jene vip-ironias en sia “maskita rakonto” *Karnavale* (Vieno: IEM, 1997, p. 17) pri memvola forlaso de la propra lingvo:

*Samkiel hom’ ŝanĝinta la dentaron
por povi pave montri tute oran,
realiginte sian revon korean,
ĉar ja neniu trudis tiun faron;
aŭ kiel homo kiu ne protestis
transplanton de la lango ĝisradike,
pri kio li fieras kokerike,
ĉar de giganto la greftaĵo estis,*



*same al ni neniom devas ĝeni
elradikigi nian lingvon tute,
senplende ĝin forgesi absolute,
por plej genian lingvon jam alpreni,
kiu, sen trompo aŭ mensogo flata,
meritas nomon — fajna kaj sonora,
originala, riĉa kaj kolora
kaj estas inter ĉiuj laŭreata.*



ajn rajtojn?

volas perdi la anglan de Allan Bold³. Miaopinie, ĉi tiun problemon oni povas demokrate solvi nur se oni konsideras ke la proprietanto de iu teritorio estas la tuta loĝantaro, sendepende de la lingvoj parolataj. . . kaj ankaŭ, kompreneble, sendepende de religio, etno ktp.

Konsiderataj en DB kiel individuaj lingvaj rajtoj estas la sekvaj (Art. 3,1):

1. la rajto esti agnoskata kiel ano de lingva komunumo;
2. la rajto uzi sian lingvon private kaj publike;
3. la rajto uzi sian propran nomon;
4. la rajto rilati kaj asociiĝi kun aliaj membroj de la sama lingva komunumo;
5. la rajto konservi kaj disvolvi la propran kulturon (mi aldonus: sed ne altrudi ĝin al aliaj).

Sekve aperas la t.n. kolektivaj lingvaj rajtoj (Art. 3,2):

1. la rajto pri instruado de siaj propraj lingvo kaj kulturo (mi aldonus: sed ne trudi tiun studon al alilingvanoj);

2. la rajto havi kulturajn servojn;
3. la rajto ke la lingvo kaj kulturo de ĉiu grupo ĉeestu en la komunikiloj en justa mezuro (mi aldonus: en la ŝtataj komunikiloj, kiuj estas pagataj de ĉiuj proporcie, sed oni ne povas devigi privatulojn);

4. la rajto ricevi respondon en sia lingvo ĉe la publikaj instancoj kaj en rilatoj sociaj kaj ekonomiaj. (Mia aldono: kiel antaŭe.)

La Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj troveblas en pluraj lingvoj (sed ne en Esperanto) ĉe <http://www.troc.es/mercator/>
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, en Esperanto: <http://www.unhchr.ch/html/menu6/1/esperant.htm/>, aŭ <http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/dem/udhr.htm/>

Alvoko de Japana E-Instituto (la kolektado de subskriboj jam finiĝis): http://www2s.biglobe.ne.jp/~jei/hp/materialo/rajto_e.htm/

Lingvaj, kulturaj kaj politikaj rajtoj estas strikte interligitaj. En marto 1998 miloj manifestaciis en Nantes (Francio) "por reunuigi Bretonion": kvin departementoj, kies numeroj videblas sur la puloveroj, devus kune formi unu regionon.

Ĉi tiuj estas bazaj elementoj. Sed DB estas kompleksa dokumento kun 52 artikoloj analizantaj la problemon tre detale. Tamen ĝi havas tre gravan malsanon: "teritorio" ĉiam revenas. DB diras, ekzemple: "ĉiu lingva komunumo havas la rajton decidi kiu-grade ĝia lingvo devas ĉeesti, kiel lingva vehiklo kaj kiel studobjekto, je ĉiuj eduk-niveloj ene de ĝia teritorio. . ." Sed kion fari, kiel okazas en preskaŭ la tuta mondo, se en teritorio vivas parolantoj ne nur de unusola lingvo, sed de du aŭ tri? Ekzemple: en Kata-

lunio ĉirkaŭ duono de la loĝantaro estas kastili-parolanta; en Kosovo nur ĉ. 10% estas serba-parolantoj ktp ktp.

Sekve, DB prezentas serion da aliaj lingvaj rajtoj, kiel i.a.:

1. Ĉiu lingva komunumo rajtas ke la juraj kaj administraj aktoj, la publikaj kaj privataj dokumentoj fariĝu en la lingvo "propra al la teritorio". (Art. 17,2)

2. Ĉiu [membro de ĉiu] lingva komunumo rajtas disponi kaj ricevi ĉiujn oficialajn dokumentojn en sia lingvo en "la teritorio kie tiu lingvo estas propra". (Art. 17,1)

3. Ĉiu lingva komunumo rajtas ke la leĝoj kaj aliaj juraj dispozicioj ĝin koncernantaj publikiĝu en "la lingvo propra al la teritorio". (Art. 18,1)

4. Ĉiu lingva komunumo rajtas ke la dokumentoj de notarioj aŭ de publikaj funkciuloj estu redaktitaj "en la lingvo propra al la teritorio". (Art. 22)

5. Ĉiu homo rajtas ricevi edukadon "per la lingvo de la teritorio kie li vivas". (Art. 29,1)

"Ekvivalenta historieco"

Ni ekzameni ankoraŭ artikolon 1,5: "Ĉi tiu deklaro konsideras kiel lingvan grupon ĉiun socian grupon kiu havas la saman lingvon kaj loĝas en la teritoria spaco de alia lingva komunumo, sed *sen ekvivalenta historieco*. . ." (mia substreko). Tiu "teritoria spaco" kaj "ekvivalenta historieco" tremigas min kaj portas al mi la teruran imagon de homaj tragedioj ne tre foraj.

Eble estas la horo ke ni, esperantistoj, meditu kaj diskutu pri ĉi tiu problemo — sed tion ni faros certe laŭ vere universala, homarana vidpunkto. Pro tio ke ni ne havas grandajn aŭ malgrandajn imperiismojn, ni estas eble la solaj kapablaj adekvate fari tion. Kaj ankaŭ ne forgesendas alia grava lingva rajto: la rajto de ĉiu homo aŭ komunumo uzi kiel propran iun ajn lingvon kiu ne estas ĝia denaska.

Manuel de Seabra (Barcelono)

1. Alba: reĝlando en la 9-a jc., kerno de la posta skota reĝlando.
2. McDiarmid, Hugh (1892-1978): skota poeto, revigliganto de la skota poezio ekde la 20-aj jaroj.
3. Bold, Allan (1943-): anglalingva skota verkisto.

PRI LINGVAJ RAJTOJ, TRILINGVE:
Al lingva demokratio / Towards Linguistic Democracy / Vers la démocratie linguistique.
Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj. Red. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Trilingva. Rotterdam: UEA, 1998. 212p. 24cm. 22,50 gld.




Krokodili: ne plu tabuo?

Bezono de lingva politiko por TEJO fonis ĝian seminarion pri "Lingvaj rajtoj — lingva politiko" (Budapeŝto, 11-18 oktobro).

Kiel internacia junulara organizo, TEJO partoprenas en pluraj internaciaj forumoj. Tie niaj reprezentantoj havas la taskon doni la opinion de TEJO pri la diskutataj temoj, kiuj kutime koncernas la

kiu okazis de la 11-a ĝis la 18-a de oktobro en Budapeŝto. Refoje la Eŭropa Junulara Centro de Eŭropa Konsilio akceptis nian grupon, tri-dekon da gejunuloj el dek sep landoj.



junularon. Ne ĉiam tio facilas. Nia regularo kaj la statuto de UEA donas nur kelkajn bazojn: ni ja estas por la homaj rajtoj, sed krome neŭtralaj pri preskaŭ ĉio, krom lingvaj aferoj.

Sed kion tio fakte signifas? Ni ja konscias ke propagandado de Esperanto malhelpas ke oni konsideru nin kiel seriozan diskutpartneron en tiuj rondoj. Do ni devas proponi ankaŭ aliajn ideojn rilate lingvajn demandojn. La bezono de lingva politiko por TEJO estis la fono de ĝia seminario pri "Lingvaj rajtoj — lingva politiko",

La unuaj du tagoj de la seminario estis dediĉitaj al sociaj kaj psikologiaj aspektoj de lingvoj, helpe de prof. Tove Skutnabb-Kangas kaj Claude Piron. Ankaŭ prezentiĝis internaciaj paktoj, kiel la Eŭropa Ĉarto de Regionaj aŭ Minoritataj Lingvoj. Poste eblis konatiĝi — ekz. per vizitoj al la ministerio pri edukado kaj al kroatingva gimnazio — kun praktikaj aplikoj de lingva politiko en la gastiga lando Hungario, kiu havas tre progresman leĝaron por proktekti la rajtojn de siaj etnaj malplimultoj. Transirante

al la esperantista starpunkto, Ziko M. Sikosek skizis la evoluon de la lingva politiko de la E-movado, kun emfazo de diversaj deklarioj kaj manifestoj ĝis la Manifesto de Prago (1996).

Kun ĉio ĉi kiel bazo, ni povis ekpensi pri kreo de lingva politiko por TEJO. Bedaŭrinde por tiu laboro restis nur la du lastaj tagoj, kiuj sekve iĝis tre intensaj. La partoprenantoj vigle diskutis pri bazaj valoroj kaj pri la interna kaj ekstera aspektoj de lingva



Tove Skutnabb-Kangas ĝuas mondan aŭtoritaton pri lingvaj rajtoj.

Ziko M. Sikosek prilumas la lingvan politikon de la E-movado.

politiko en kampoj kiel malplimultoj, edukado kaj internaciaj rilatoj. Per granda fortostreĉo ni venis al aro da labordokumentoj ankoraŭ bezonantaj poluradon, kiuj certe servos kiel bazo por la lingva politiko de TEJO.

Nature, la diskutoj tuŝis multajn tradiciajn starpunktojn de la E-movado. Ekzemple, se laŭdifine ni celas al efika interhoma komunikado kaj al translimaj kontaktoj inter homoj, ĉu ni ne agnosku ke tio, depende de la situacio, multfoje eblas ankaŭ per aliaj lingvoj ol Esperanto? Se iuj en iu momento ŝatus interkomuniki per sia komuna gepatra lingvo, kial ni kondamnu tion kiel "krokodiladon"? Repripensante la bazajn ideojn malantaŭ nia esperantisteco, ni trovas ke ekzistas ankaŭ aliaj manieroj por realigi ilin ol sole "disvastigo de Esperanto".

Saskia Idzerda (Nederlando)

Fotaj kampare de Ziko M. Sikosek



Estas tempo rekotizi por 1999!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. *Antaŭdankon!*

**MULTKOLORA GLUMARKO
IGAS VIAJN KOVERTOJN
PARTOPRENI EN KAMPANJO 2000!**

Prezo de folio (12 markoj): 3,00 gld.
Triona rabato ekde 3 folioj.



Grimpendaj etaĝoj ĉe Unesko

UEA kaj ILEI ĉeestis plurkape la Konferencon de Neregistara Organizaĵoj (NRO-j) havantaj oficialajn rilatojn kun Unesko.


En la Pariza Unesko-domo konferencis, de 16 ĝis 19 nov., ĝenerala direktoro Osmo Buller, Vincent Charlot, d-rino Natalia Dankova kaj Roch Jullien kiel UEA-representantoj, kaj d-ro François Lo Jacomo kaj Petro Lévy por ILEI.

Inter la rutinaj eroj plej gravis la elekto de novaj reprezentaj organoj de la NRO-komunumo: de 9-membra Kontakt-komitato kaj de 40-membra Konsilio. Kiel nova prezidanto elektiĝis s-ino Monique Fouilhoux el Edukado Internacia. Kvankam UEA, kiu membris en la malnova Konsilio, ne povis renovigi sian mandaton, ankaŭ en la nova Konsilio troviĝas esperantisto. Nome, Rotario Internacia fariĝis membro de la Konsilio, kaj ĝin reprezentas Marc Levin, sekretario de Rotaria Amikaro de Esperantistoj.

Scienca etiko (ekz. ĉe gen-teknologio), batalo kontraŭ malriĉeco kaj aliaj temoj pri kiuj la konferencanoj aŭdis amason da prelegoj, apenaŭ tuŝis kampojn pri kiuj UEA rekte okupiĝas. Pri malriĉeco oni ricevis konkretan memorigon, ĉar en unu tago la halo de Unesko pleniĝis de demonstra-ciantaj infanoj de enmigrintoj, kiuj kun la gepatroj postulis pli bonan traktadon. Ili ankaŭ blokis la lifton, tiel ke la konferencanoj devis grimpi al la sepa etaĝo por oficiala akcepto.

2000: Por la Kulturo de Paco

Malgraŭ la tre specialaj temoj de la konferenco, ĝia ĉefa rezolucio tamen postulas aktivan engaĝiĝon ankaŭ de esperantistoj. Ĝi temas pri la homaj rajtoj kaj la kulturo de paco. UEA kaj



ILEI povis varme subteni ĝin, ĉar li jam faris multon por kontribui al ĝiaj celoj. Tiu agado eĉ pli intensiĝos kadre de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco en 2000 kaj lok-trafe kulminos en la tiujara Universala Kongreso en Tel-Avivo.

Al la ĝenerala direktoro de UEA la konferenco donis okazon al utilaj renkontiĝoj kun oficialuloj de Unesko. Li povis persone danki al Charles Power, asista ĝenerala direktoro pri edukado, pro ties enhavoriĉa mesaĝo al la Montpellier UK. Power bone orientiĝas pri UK-oj: aŭdinte la nombron de la kongresanoj, li tuj konjektis ke temis pri la plej granda UK de la jardeko. Power interesiĝis ankaŭ pri la progreso de la kontribuo de UEA kaj ILEI al Lingua-pax kaj konsilis pri la necesaj paŝoj por ricevi pluan apogon de Unesko.

Kunlabori eldone kaj regione

Kun Kaisa Savolainen, seki-estrino pri humanisma, kultura kaj internacia edukado, Buller diskutis pri Esperanta eldonado de tiukampaj materialoj de Unesko. Savolainen dankis pro la eldono de *Homaj rajtoj: demandoj kaj respon-do* (vd. p. 217), kaj prezentis baldaŭ aperontan manlibron pri homrajta edukado, kies esperantigon ŝi rekomendis.

Por vere tutmondigi la kunlaboron kun NRO-j, Unesko starigas regionajn NRO-retojn sub kunordigo de prof. Raoul Chelikani. Kun li Buller pri-parolis la enplekton de la kon-cernaj landaj asocioj de UEA en la NRO-reton por Azio kaj Pacifiko. Poste sekvis samo en Afriko kaj Latinameriko.

Menciindas ankaŭ la interesa kon-versacio de Vincent Charlot kaj Natalia Dankova kun Claire Jordan (Inter-nacia Federacio de Virinoj en Juraj Profesioj), la ĝisnuna prezidantino de la NRO-komunumo. Ŝi esprimis sian simpatian al la esperantistoj pro ilia defendo de la rajtoj de malgrandaj lingvoj. Ŝi diris ke "Esperanto estas ne-moda afero de pasinteco, al kiu verŝajne apartenas la estonteco", eĉ se kiel franclingvano ŝi iom bedaŭras ĉi tion.

La esperantista Unesko-agado nun spertas novan revigliĝon kun nov-specaj defioj. Tial estas tre esperige ke nia teamo en Parizo plifortiĝis per novaj entuziasmaj membroj. Espereble ni povos baldaŭ raporti pri simila kresko de entuziasmo ankaŭ en la Unesko-rilatoj de landaj asocioj kaj lokaj kluboj.

Osmo Buller

UEA aktivas en la 50-jara CONGO

UEA estas membro de Konferenco de Neregistara Organizaĵoj en Konsultaj Rilatoj kun UN (CONGO), forumo 50-jariĝinta la 3-an de decembro. UEA lastatempe aparte aktivas en la CONGO-agado. La UEA-representanto ĉe UN en Ĝenevo, mag. Andy Künzli, regule partoprenas la kunsidojn de la CONGO-estraro, kie eblas utile rilati kun reprezentantoj de aliaj NRO-j. Estas preparata Internacia Konferenco de NRO-j (Seulo, 11-17 okt. 1999),



kies temo estos "La rolo de NRO-j en la 21-a jarcento". En la organizado engaĝiĝis ankaŭ la landa asocio de UEA, Korea E-Asocio: ĝia vicprezidanto Ĝongse Lee partoprenis la 29-an de sept. surlokan preparakunsidon.

Kiel UEA-representanto, Künzli ankaŭ sendis saluton al la juda komunumo en la svisaj urboj Berno kaj Biel okaze de ilia 150-jara jubileo kaj partoprenis la 18-an de okt. la memoran solenaĵon en la sinagogo de Berno.

84-a Universala Kongreso de Esperanto

Berlino, 31 julio – 7 aŭgusto 1999

Berlin Tourismus Marketing

Adresoj

Konstanta: CO de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎ +31/10/436-10-44; ✉ 436-17-51; ✉ uea@inter.nl.net.

LKK, kasisto: Helmut Krone, Hohenschönhauser Weg 3, DE-10315 Berlin, Germanio.

Pri ĉio krom pago de kotizoj kaj de mendoj bv. korespondi nur kun la CO (Kongresa Fako), ne kun LKK, kies anoj ne povas trakti individuajn petojn.

Loka Kongresa Komitato

LKK bonvenigas helpon de germanaj e-istoj: Ina Tautorat, Falkstrasse 25, DE-12053 Berlin, Germanio; ☎ +49/(0)30/687-31-30; ✉ 680-874-88.

Loĝado

En februaro ĉiuj aliĝintoj ricevos la Duan Bultenon kun oferto de hoteloj. **Malmultekosta loĝado** (120-180 gld. por tuta semajno) eblas iom ekster la urbeĝo, sed kun bonaj trafikaj ligoj. **Junulara amasloĝejo** estas rezervita por gejunuloj sub 33 jaroj, kun propra dormsako. Por informoj pri prezoj kaj aliĝoj uzu apartan aliĝilon (ricevebla ĉe CO de UEA) aŭ kontaktu David-Emil Wickström, Weseler Str. 17, DE-10318 Berlin, Germanio; ✉ junulara.programo@esperanto.de.

Infana Kongreseto

Por E-parolantaj infanoj de 6 ĝis 14 jaroj: Sabine Trenner, Ebertystr. 46, DE-10249 Berlin, Germanio; ☎ +49/30/426-86-05; ✉ trine@berlin.snafu.de.

Ekskursoj, antaŭ-kaj postkongresoj

La Dua Bulteno proponas tut- kaj duontagajn ekskursojn en kaj ĉirkaŭ Berlino, plejparte kreitajn por nia Kongreso, ne eblajn kadre de ordinara turismado. La **antaŭkongresoj** konstante trairedos la limon inter Pollando kaj Germanio. La **postkongresoj** vizitos diversajn partojn de la granda lando, ekz. kroze laŭ Majno kaj Rejno.

Vizoj, invitleteroj

Gravas tre frue kontroli ĉe la plej proksima konsulejo de Germanio la kondiĉojn por ricevi vizon kaj prepari ĉiujn necesajn dokumentojn. Se vi bezonas travojaĝi iu(j)n el la landoj Benelukso, Francio, Hispanio, Portugalio, petu Schengen-vizon. La Kongresa Konfirmilo principe sufiĉas por pruvi kongresanecon. Ĉiuj aliĝintoj el vizbezonaj landoj ricevas krome oficialan invitleteron. Bv. noti ke ĝi povas koncerni nur la oficialan daŭron de la UK (31 jul. – 7 aŭg.), plus de menditaj antaŭ- kaj postkongresoj. Al neali-

ĝintoj ne eblas sendi invitojn aŭ konfirmojn. Ĉe eniro en Germanion necesas pruvi posedon de sufiĉaj monrimedoj por la restado. Tiuj kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ kiujn UEA aparte invitis) ricevos konfirmon pri pagitaj servoj, kio povas parte kompensi la postulon pri monrimedoj. UEA kaj LKK principe ne donas financajn garantiojn al kongresanoj el nepagipovaj landoj.

TTT-ejo

Esp.: <http://www.esperanto/de/uk99/>
Germana: <http://www.esperanto/de/berlin99/>

Kotizoj

Ĝis la fino de la jaro validas jena tarifo: individua membro de UEA (IM) 295 guldonoj (el B-kategoriaj landoj: 225 gld.); ne-IM — 370 (280); komitatano de UEA, kunulo, junulo mem IM 150 (112), ne-IM 225 (170). Germanaj e-istoj ricevis aliĝilojn kun kotizoj en DEM kaj pagas rekte al la LKK.

Kunlabore kun la publika transporto, okazos ekspozicio de bus-, tram-, metro- ktp biletoj. Kunportado al Berlino transportbiletan el via hejmurbo, kaj foton de vi mem.

Antaŭ kelkaj jaroj oni aŭdadis pri vi lige al la parolsintezo sistemo Esperol, poste pro la hungara-Esperanta vortaro kiun vi redaktis kun prof. István Szerdahelyi; dum longaj jaroj vi estis ligita kun la E-fako de la Budapeŝta Universitato ELTE. Post via translokiĝo al Pollando vi "inventis" novan interlingvistikan fakon en Poznań. Kiel ĉio tio komenciĝis?

Jam pasis 25 jaroj de kiam mi ekokupiĝis pri Esperanto kiel studento en ELTE. Avida je lingvoj kaj allogate de la logikeco kaj facila lernebleco de Esperanto, mi decidis partopreni la kurson anoncitan de la E-fako. Mi ne nur lernis la lingvon, sed finstudis esperantologion. Kaptis min la ideo dank' al la interesaj prelegoj kaj simpatia personeco de prof. Szerdahelyi, kiu multe pli atentis pri siaj studentoj ol aliaj universitatanoj kaj trovis por ili konvenajn taskojn.

Poste mi eklaboris en la komputika tereno, sed lingvoj konstante tentis min, kaj tiel mi iĝis redaktoro. Sufiĉis unu malgranda salto por veni al la Scienca Eldona Centro de UEA, kiu ekfunkciis en 1981 ĉe Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto. Ni eldonis kelkajn sciencajn librojn kaj la revuon *Internacia Komputado*, poste *Fokuso*. Tiu agado, tre grava por la disvastigo de Esperanto, estis haltigita antaŭ atingo de sia prospero kaj neniam rekomencita.

Sekvis esplorado pri komputila parolprilaboro en la Budapeŝta Teknika Universitato, kiu kondukis al voĉsintezo de Esperanto kaj ellaboro de instruprogramoj. Intertempe prof. Szerdahelyi mortis, frue kaj neatendite, en 1987. Mi devis post rapida decido daŭrigi lian nefacilan laboron en la Esperanto-fako — kion li jam antaŭe proponis al mi. Mi iĝis denove profesia esperantisto, por preskaŭ 10 jaroj.

Ĉu malfacilas esti profesia e-isto?

Mi pensas ke jes. Oni devas duoble pruvii sian valoron, en Esperantujo kaj ekster ĝi. Por kontraŭbatali la malseriozan aliron de kolegoj al Esperanto kaj al e-istaj fakuloj, plej bone estas konservi iun kroman laborokampon — kiel mi konservis lingvistikon (antaŭe komputan, nun hungaran). Ankaŭ parto de la esperantistoj ne vidas sencon en scienca aŭ universitat-nivela okupiĝo pri Esperanto; por ili sufiĉas agadi en la movado.

solvon por internacia komunikado. Ĉu ni havus sufiĉe da fakuloj pri instruado, tradukado, interpretado, kun vastaj kulturaj konoj, se ili serioze konsiderus niajn proponojn? Kaj entute, se ie ajn ni volas enkonduki E-on, oni petas de ni kvalifikojn. Universitataj studoj preparas fakulojn kun kvalifiko. Ĉiukaze, devas ekzisti institucioj kiuj regule organizas diversflankajn studojn por tiuj kiuj ne volas aŭ ne povas aŭtodidakte akiri sciojn.

Nia interlingvistika fako invitas profesorojn el diversaj landoj, kiel lastfoje prof. Wells (vd okt., p. 171), kaj ebligas studadon al interesatoj el la tuta mondo. Por la unua sesio arigis 10 studentoj el 5 landoj. Maltrafintoj estas bonvenaj en la sekva studjaro.

Vi laboras ankaŭ pri leksikografio...

La hungaran-Esperantan vortaron, kiu laŭ Esperantaj kriterioj estas unu el la plej grandaj kun siaj ĉ. 65 mil leksikaj unuoj, komencis redakti prof. Szerdahelyi, kiu kunlaborigis multajn hungarajn e-istojn, inter ili diversajn sciencistojn

por provizi ĝin ankaŭ per sciencaj terminoj. Post lia morto mi daŭrigis la taskon. Post multaj malfacilaĵoj ĝi aperis en 1996, kaj HEA pretigis por la ĉi-jara UK kompaktdiskan version. Longa laboro, sklava laboro... tamen mi planadas la vortaron invers-direktan, kvankam ĉe HEA mankas mono por ĝin eldoni. Ankaŭ pri Esperanta laŭ-tema vortaro mi revas (ja mi kunlaboras pri hungara-pola temvortaro).

Gratulon pro via ĉi-jara elektiĝo al la Akademio de Esperanto.

Mi konsideras honoro mian elekton. Aliflanke mi pensas ke la Akademio devas ankoraŭ multe fari por plenumi sian rolon kaj reakiri sian prestiĝon. Mi provos kontribui laŭ miaj eblaj.

★

INTERVJUO

Duoble pruvi sian valoron

Oni regule renkontas la nomon de d-rino Ilona Koutny en Esperantujo, laste pro ŝia lanĉo de nova interlingvistika fako en Poznań (Pollando). Kiu ŝi estas?

Francjo Vauthay

Laŭ mi, en Esperantujo havas lokon kaj movadanoj kaj esploristoj, kaj eĉ homoj kiuj uzas la lingvon nur por komuniki pri poŝtmarkoj. Same devus bone kunekzisti tiuj kiuj elektis E-on kiel minoritatan kulturon kaj tiuj kiuj elektis ĝin kiel internacian lingvon. Ambaŭ grupoj riĉigas nian kulturon kaj kontribuas per interna aŭ ekstera agado al tio ke la mondo rekonu nin.

Malmultaj universitatoj ofertas alt-nivelajn studojn pri esperantologio kaj interlingvistiko: krom Budapeŝto kaj Amsterdamo eble nur Universitato Mickiewicz en Poznań. Kion celas la ĵus lanĉitaj interlingvistikaj studoj?

Multaj deziras ekzemple ke Eŭropa Unio konsideru serioze Esperanton kiel eblan

Ilona Koutny, kaptita de fotisto antaŭ la urbestra akcepto dum la Montpeliera UK

Lemaire, la belga Kabe

Antaŭ cent jaroj ekaperis en Belgio ĝermoj de la naskiĝanta Esperanto-afero. Jen unu el ĝiaj pioniroj: Charles Lemaire.

Kvankam jam pli frue kelkaj belgoj lernis Esperanton, la unua kiu vere aktivis per propagando estis la armea oficiro Charles Lemaire (1863-1926), kiun Zamenhof iam nomis “la vera patro de la belgaj esperantistoj”, sed kiu post 1908 malaperis de la scenejo. Lia aventura vivo jam estas rakontita aliloke (*Monato*, majo ‘98, pp. 25-27), sed lia grandega rolo en la Esperanto-afero meritas apartan memorigon je la nuna jubileo.

Charles Lemaire naskiĝis (26 marto 1863) en Cuesmes, perdis frue siajn gepatrojn kaj konis multan mizeron. Sed bonaj studrezultoj kondukis lin al la Armea Altlernejo de Belgio, kie li en 1886 akiris leŭtenantan gradon. De 1889 li kariesis en Kongo, sendependa ŝtato kreita de la belga reĝo Leopoldo la 2-a. Plurfoje komisiita pri sciencaj ekspedicioj en Afriko, li rapide promociiĝis (kapitano en 1898, kapitano-komandanto en 1902).

Letero en la unua vespero

En 1897 Lemaire hazarde eksciis pri iu internacia lingvo, rapide lernebla el franca broŝuro de iu de Beaufront. Li trastudis ĝin en unu posttagmezo kaj vespere jam skribis en Esperanto al de Beaufront. La baldaŭan respondon li tute komprenis, kio konvinkis lin pri la valoro de Esperanto. Li komunikis sian entuziasmon al anoj de Cercle Polyglotte (“multlingva rondo”), kies estrarano li estis, kaj en dec. 1897 prelegis al ili pri tiu mirinda Esperanto.

Estante unu el la administrantoj de nova liberala ĵurnalo Brusela, *Le Petit Bleu*, Lemaire povis konvinki la redakcion publikigi lian prelegon. Ĝi aperis en ok sinsekvaj eroj, de 17 dec. 1897 ĝis 1 jan. 1898, kaj poste ankaŭ kiel libreto: *L'Espéranto, solution triomphante du problème de la langue universelle* (“E-o, triumfanta solvo de la problemo de la universala lingvo”).

Li konvinkis influaĵajn riĉulojn, i.a. Solvay kaj Lambert, finance kontribui por distribui la libreton al universitatoj, bibliotekoj k.a. Poste li atingis ke *Petit Bleu* aperigu ĉiusemajne tekston paralele en E-o kaj la franca.

Sed jam en aprilo 1898 Lemaire devis forvojaĝi al Afriko por trakontinenta esplorvojaĝo. Reveninte fine de 1900, li denove fervore ekagis por E-o, nun per bone planitaj strategioj. Li organizis prelegojn en universitatoj, instalas subtenan komisionon, stimulis starigon de lokaj grupoj k.a. Plej grave, li lanĉis kaj mem financis nacian Esperanto-revuon, *Belga Sonorilo*.

Nova ekspedicio tenis lin for de junio 1902 ĝis la fino de 1905. Ĉe sia reveno li trovis evoluantan situacion: ekzistis jam pluraj agemaj grupoj, kaj la 30-an de julio 1905 estis fondita Belga Ligo Esperantista (BLE), kies prezidantecon oni rezervis por li.

Informite pri la sukceso de la unua UK (1905), Lemaire proponis prelegon por la sekva UK pri siaj afrikaj spertoj. La prelego “Tra Mez-Afriko” en la Ĝeneva UK (1 sep. 1906), kun abundaj lumbildoj, impresis la Ĝenevan publikon. Aperinta ankaŭ libroforme, ĝi estas unu el la unuaj valoraj kontribuoj al la scienca E-literaturo.

La famo de Lemaire rapide disvastiĝis en la juna movado, kaj li inspiris eĉ Jules Verne por *Voyages d'études* (“Esplorvojaĝo”), romano Esperanto-rilata, kiu restis nefinita pro la morto de la aŭtoro en 1905. (Ĝia E-traduko aperis en 1994, kiel numero de *Franca Esperantisto* –Red.)



Charles Lemaire: “...negroj estas homoj posedantaj plene la proprecojn de la homaro, sekve ĝiajn rajtojn, ĝiajn devojn.” Ne ĉies opinio en 1906.

1907: Jaro duoble fatala

Sed fiaj politikaj cirkonstancoj kaj stranga konflikto kun la reĝo abrupte finis la karieron de Lemaire en januaro 1907. Dum tuta jaro li devis defendi sin kontraŭ akuzoj, verki tekstojn pri afrikaj spertoj, interveni en politikaj aferoj k.a. Nur 44-jara, li decidis peti sian pension kaj retiriĝi al farmbieno.

Kiam en 1907 aperis Ido, Lemaire — jam favorinta modifojn en Esperanto — distanciĝis de la klasika Esperanto, ignorante ke elprovita lingvo-uzo pli valoras ol eksperimentado. En la fino de 1908 li eĉ eksciis kiel prezidanto de BLE, kunprenante sian revuon, kiu de tiam uzis Idon.

Sed certe li iom post iom konstatis ke la Ido-movado malsukcesos, dum la E-movado plu bone funkciis. I.a. la sukceso de la 7-a UK

(1911), organizita en Antverpeno en konsento kun la nacia ligo kiun li iam prezidis, pruvus tion. En 1912 li eĉ devis haltigi *Belga Sonorilo* pro manko de legantoj.

Malfeliĉa pro perditaj amikaj rilatoj en la movado por internacia lingvo kaj pro la maljusta sorto suferata pro kapricaj situacioj en Belgio, Lemaire — sola en la kamparo, sen familio, suferante la mizeron de la unua mondmilito — dediĉis sin al aliaj interesoj. Post la milito li evitis kontaktojn kun la movadoj por Esperanto kaj Ido.

En siaj lastaj vivjaroj li estis direktoro de la Kolonia Altlernejo en Antverpeno, establita je lia iniciato. Li mortis en Bruselo la 21-an de jan. 1926.

Jen kiel la Esperanto-afero tro frue perdis tre valoran homon, kies pluajn kontribuojn ni povas nur imagi. Fakte, Charles Lemaire estas apostato de sama grandeco kiel la pli konata Kabe.

Wim M.A. De Smet (Belgio)

Influo

Por plibonigi la fluon de informoj pri informado



Numero 18

E l loka gazeto en Florido, The Polk County Democrat (29 junio): “Mi ĵus sendis balotilon al Nederlando

por 8 el 16 kandidatoj por funkcio en internacia organizo. Mian voĉon ricevis kandidatoj el Koreio, Barato, Kostariko, Ĉinio, Hispanio, Ruslando, Israelo kaj Japanio. Mi scias la gepatran lingvon de neniu el tiuj [...]. Mi tamen povis fari decidon leginte iliajn biografi-etojn kaj [...] celojn [...] en la internacia lingvo Esperanto. Se iu leganto deziras scii pli... [Sekvas la adreso de la verkinto, Arland R. Meade.]

La komitataj elektoj de UEA ne tuŝas la vivon en Florido. Kial do la redakcio akceptis la tekston? Ĉar ĝi prezentas nekutiman personon sperton de leganto.

K. Kniivilä skribis (okt., p. 165) pri la graveco de personaj spertoj en nia informado. S-ro Meade donis imitindan ekzemplon pri tio.

Asahi, Le Monde: kiel aperi?

En Montpeliero nia japana dumviva membro MIYOSHI Etsuo (cetere la mecenato de Subvencio Cigno), konstante verkadis kaj sendis, jam de la kvina matene, kongresajn informojn al 50 japanaj ĵurnalistoj. Rezulte, la gazeto *Zaikai* aperigis lian tutan manuskripton, kaj li estis kontaktita de TERADA Kenji, ĵurnalististo de Asahi Ŝinbun, la plej prestiĝa taggazeto de Japanio (pli ol 12 milionoj da ekz-oj, 3 000 ĵurnalistoj). Terada



MIYOSHI Etsuo
(Fotis François Vauthey)

vizitis la Japanan Kongreson (3-4 okt., Kanazawa) kaj aperigis imponan artikolon pri ĝi kaj pri E-o mem la 31-an de okt. (Laŭ Reza Kheir-Khah) La eldonkvante malpli granda, sed tutmonde fama franca *Le Monde* riparis sian “UK-raportan” mispaŝon (vd. sep., p. 145) per tutpaĝa artikolo (4 nov.) de Roland-Pierre Paringaux, kiu paroligis junajn e-istojn kaj prezentis Esperanton en ekvilibra, eĉ favora tono.


amaskomunikiloj

Nederlando: Televido

Unuhora dokumentaĵo de Thomas Doebele kaj Maarten Schmidt, “La postlasaĵo de doktoro Esperanto”, estis elsendita la 8-an de nov., dimanĉe vespere, de tutlanda kanalo. Interplekte kun malnovaj filmfragmentoj, ili paroligis veteranajn e-istojn. Prof. Marc van Oostendorp donis lingvistikajn klarigojn; Hans Erasmus priskribis la NEIGHBOUR-projekton. Ankaŭ oficistojn de UEA oni vidis en la filmo; redaktoron István Ertl eĉ kun lia familio, kiel ekzemplon pri hejma uzo de Esperanto. (UEA-oficistoj diversmaniere helpis la filmistojn dum monatoj.)

La prestiĝa taggazeto *NRC Handelsblad* juĝis la verkon “instrua kaj interesa, ame filmita”.

La landa asocio Esperanto Nederland mendis anoncojn en ĉiuj gravaj tutlandaj gazetoj de la antaŭa vendredo. Pri kroma reklamo zorgis multaj redakciaj prezent-artikoloj en la televidaj rubrikoj de la samaj kaj aliaj gazetoj. Kvarpaĝa artikolo de la televida magazino *VPRO Gids* eĉ aperis kun E-lingva kovrililo kaj porokaze esperantigita titolo, *VPRO Gvido*. La elsendo altiris 85 mil spektantojn. Ene de 36 horoj post ĝi alvenis jam 200 informpetoj al la kontaktadreso de Esperanto Nederland, kaj en la sekvaj 2 semajnoj 150 pliaj.



Artikolo

“E-o reinventas por si estontecon en la Reto”, artikolis france la svisa TTT-magazino *Webdo* (sep.): http://www.webdo.ch/webdo_mag/webdo_mag_06/langage_06.html



Influo aperas kiel regula suplemento al *Esperanto*. **Redaktoro:** Geoffrey Greatrex, Apt. 102, 995 McLean Street, Halifax, Nova Scotia, Kanado B3H 2V2; ☎ +1 902 494 7153; ✉ 494 2467; ☐ Geoffrey.Greatrex@dal.ca **Informa Fakto de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎ +31 10 436 1044; ✉ +31 10 436 1751; ☐ uea@inter.nl.net

Francio: Televido, gazetaro

La internacia francilingva televido TV5 aperigis 9-paĝan informon pri la UK kaj pri Esperanto en sia teleteksto, inkluzive prezenton de la gramatiko kaj eblajn kialojn de tio ke Esperanto ĝis nun ne estas "unuanime" akceptita en la tuta mondo. (*Starto*)

En Francio pluraj naciaj kaj regionaj gazetoj aperigis trafikajn artikolojn lige al la UK, i.a. *La Croix*, *L'Humanité*, *Le Dauphiné Libéré* kaj *Le Midi Libre*. (*Cher-Esperanto*)

Paĝo de *Avant-Garde*, gazeto de francaj junkomunistoj, temis en septembro pri E-o; intervjuigis Bruno Flochon, prezidanto de la junulara E-asocio JEFO. (Vincent Charlot)

Hungario: Gazetaro, radio, televido

Okaze de la apero de *La serĉado de la perfekta lingvo* de Umberto Eco hungarlingve, la plej prestiĝa hungara magazino, *HVG* (200 mil ekz.), publikigis la 4-an de jul. dupaĝan artikolon pri "mondlingvo-projekto", asertante ke Esperanto "iĝis viktimo de babeliĝo". En duon-paĝa reago (25 jul.) Géza Felső atentigis: "neŭtrala interlingvo estas [...] verŝajne la sola vojo por konservi la multlingvecon kaj kulturen buntecon de la mondo".



La perfekta lingvo plu stimulas debatojn; ĉi-foje en Hungario.


la tutlanda televido RTL Klub (9 nov.). Princz parolis pri E-o kiel perilo de la hungara kulturo kaj pledis por la uzo de E-o kiel sendiskriminacia, egalrajta komunikilo internacia, i.a. en EU. (Oszkár Princz)

Budapeŝta radio prezentis en unuhora intima programo (27 sep.) György Nanovfszky, eks-ambasadoron de Hungario en Rusio, prezidanton de Hungaria E-Asocio, kiu parolis ĉ. 5 minutojn pri E-o. (B. Vaha, J. Schiller)

Same 5 minutojn daŭris matena intervjuo kun la ĝenerala sekretario de HEA, Oszkár Princz, en

Prelego pri mondvojaĝo

Bruno kaj Maryvonne Robineau prezentis en la Montpelliera UK sian okjaran mondvojaĝon — en kiu Esperanto grave rolis



Francjo Vauthey

(vd. majo, p. 82) — per lumbilda prelego. Ĉi ties francilingva versio estis jam vidita de pli ol 35 000 homoj, el kiuj multaj tie aŭdis unuafoje pri Esperanto, kaj almenaŭ kelkaj eklernis la lingvon. La mondvojaĝo plu efikadas reklame por Esperanto, ĉu kiel prelego france aŭ Esperante (tradukebla en la anglan aŭ hispanan), ĉu kiel libro en la samaj du lingvoj (ambaŭ 45,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA). Informoj kaj broŝuro pri la prelego: ges-roj Robineau, Le Moulin Boireau, FR-49270 Landemont, Francio; ☎+33/240-98-78-76; ✉Bruno.Robineau@wanadoo.fr.

publika agado

Ĉeĥio: Ekspozicio

La E-rondeto Amikeco kaj la E-parto de la urba muzeo en Česká Třebová aranĝis ekspozicion "La mondo sen interpretistoj" (12-25 sep.) pri la E-movado tutmonde kaj loke. En la malfermo parolis Vlastimil Kočvara, prezidanto de Ĉeĥa E-Asocio. (Jiří Pistora)

Germanio: Foiro

La "infanurbo" Mini-München ("Malgranda Munkeno, 30 jul.-22 aŭg.) en la Olimpika Parko estis vizitata de 35 000 infanoj. Ĝi havis 16-jaran urbestrinon kaj eĉ propran Universitaton Comenius, kies oficiala programo proponis E-lingvokursojn. Ankaŭ en "virtuala Mini-München" (<http://www.minimunch.musin.de>) okazis E-kurseto, zorge de Bea Huber. Iniciatis ĉion E-klubo de Munkeno, investinta ĉ. 3 000 markojn. Rezulte, al la kursoj kaj prelegoj venis pli ol 400 infanoj, el kiuj 51 "doktoriĝis" kaj 13 "profesoriĝis" (ekrajtis mem gvidi kurson); dank' al televidkaj gazet-raportoj pli ol 100 000 homoj povis ion aŭdi pri E-o. (F. Hilpert).

interreto

Novaj-servo

La novaĵservo Ret-Info distribuas informojn rilatajn al la Esperanto-movado per retpoŝto. La pluraj centoj da aliĝintoj — aktivuloj, redaktoroj, estraranoj de E-asocioj kaj aliaj interesatoj ricevas en ĉiu labortago averaĝe 2-5 mesaĝojn, kiuj estas "filtritaj": ne estas dissendataj informoj de tro malgranda graveco. Ret-Info liveras aktualajn informojn, kiujn la kunlaborantoj kaj aliaj ak-



tivuloj sendis por distribuado; la ĉefajn materialojn de Interredaktore, la kunlabora forumo de E-redaktoroj; la retpoŝtan version de *Eventoj* kaj de *La Merkato*; informojn pri la novaj E-servoj en la reto; interesajn artikolojn kiuj pro limdataj aŭ spacomankaj kialoj ne povas eniri en la paperajn gazetojn k.m.a.

Koncizajn raportojn por Ret-Info sendu al ✉ret-info@esperanto.org. Informoj pri la servo haveblas sam-adrese kaj ĉe <http://www.hungary.net/esperanto/ret-info.htm>.

Ricevantoj pagas aliĝkotizon de 45 gld. por 12-monata periodo (25 gld. por B-landanoj) komencebla kiam ajn al la UEA-konto "ells-s", informante la administranton pri siaj retadreso kaj nomo.

Pri monpetaj leteroj

Ree cirkulas monpetaj leteroj, eĉ lukse presitaj, kies sendintoj prenis adresojn el Jarlibro aŭ Kongresa Libro de UEA. Ĉar multaj antaŭaj petletoj montriĝis trompaj, UEA konsilas ne donaci monon al petinto sen certiĝi pri la vereco kaj honesteco en ĉiu kazo. Konsilindas informi pri ĉiu ricevita peto la Centran Oficejon, kiu klopodos esplori ties seriozecon. UEA-adresarojn oni rajtas uzi nek por almozpetado nek por komercaj ofertoj. Ĉiu misuzanto estos rifuzita kiel individua membro kaj kongresano. Esperantistaj viktimoj de militoj kaj de naturkatastrofoj povas peti helpon de Konto Espero de UEA. Al komercaj agantoj ni rekomendas ke ili klopodu varbi klientojn kaj partnerojn per anoncoj en la UEA-eldonaĵoj.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro

Ago-Tago: mobilize aŭ rutine?

Malgraŭ la rapidaj ebloj de moderna komunikado, ni ricevis raportojn pri la Ago-Tago (la 3-a de okt., sabate) nur el 10 landoj.

Argentino

Kordoba E-Asocio dissendis retmesaĝojn Esperante kaj hispane, instigante al plia uzo de E-o en la komputilaj retoj, tradukado de propraj hejmpaĝoj en E-on, praktikado de la lingvo en E-babilejoj, kaj insista demandado, ĉe aliro de diversaj babilejoj, ĉu troviĝas tie konantoj de Esperanto. (Roberto Sartor)

Finnlando

Ago-tagante du semajnojn pli malfrue, E-Asocio de Finnlando ankaŭ ĉi-jare partoprenis la Librofoiron en Turku (16-18 okt.). Prezentigis "la hejma salono de ordinara E-familio": la televidilo daŭre montris Mazi-filmojn, la "fenestroj" havis verdajn kurtenojn, sur librobreto staris E-flago. "Loĝis" en la ĉambro i.a. verkisto-aŭdiologo d-rino Aira Kankkunen, kiu finne, svede kaj Esperante prezentis siajn beletrajn verkojn, respondis al demandoj kaj prelegis pri E-o. En la sciencia sekcio de la foiro ŝi lekciis pri sia fako: infan-aŭdiologio kaj aŭdhandikapito.

En la Ago-Tago mem regiona gazeto aperigis artikolon de Claude Piron pri psikologiaj aspektoj de Esperanto. (Raita Pyhälä, *Informilo* de E-Societo en Turku)

Francio

La 10-an de okt., sabate, la E-grupo de Strasburgo organizis en la urba domo de asocioj ekspozicion pri la homaj rajtoj, emfazante la lingvan flankon. Ĉi-teman prelegon de Armand Hubert, sekretario de la asocio Esperanto France-Est, aŭskultis dudeko da homoj. Fine de la prelego junaj gee-istoj legis artikolojn de la Deklaracio de Homaj Rajtoj france, germane, itale, hispane, rumane, ruse kaj en Esperanto. Raportis la regionaj radio kaj gazetaroj. (Edmond Ludwig)

Kroatio

En Zagrebo, por lanĉi la afiŝon de la UK de 2001, Kroata E-Ligo kunvokis la 1-an de okt. en la prestiĝa hotelo Esplanade gazaran konferencon, akompanatan de kultura programo. La publiko eksciis ke la Ago-Tago samtempe en multaj landoj, kies E-centroj jam pendigis la Zagreban afiŝon. Ĉeestis la televido OTV kaj kvar gazetoj: la ĵurnaloj *Jutarnji List* kaj *Vjesnik* publikigis foton de la afiŝo. Kontribue al la informado pri la UK, la turisma asocio de la urbo Zagrebo akceptis ekspedi siakoste la aŭtunan numeron de la revuo *Tempo* al 200 movadaj adresoj.

En Osijek, la E-societo Liberiga Stelo ekspoziciis en la montrofenestro de la urba banko, reklamante Osijek kiel la organizanton de la Tria Kongreso de la Kroataj E-istoj en majo 1999. (Spomenka Štimec)

Siaflanke, Kroata E-ista Unuiĝo okazigis Ago-Tagon tri tagojn pli frue, pro vizito (2-4 okt.) de la papo al Kroatio. Same kiel en antaŭaj jaroj, staris budo en la ĉefa Zagreba ĉiovendejo NAMA, kie la vizitantoj povis

trafoliumi lingvoinstruajn kaj religiajn eldonaĵojn, vidi ekspozicion pri "Infanoj kaj la edukado", spekti la Mazi-kurson kaj aliajn E-videbendojn aŭ legi la homrajtan alvokon de Japania E-Instituto (vd. okt., p. 172). (KEU)



La lanĉo de afiŝo por la unua UK en la nova jarmilo estis elstara Ago-Tag-ero en Zagrebo.

Pollando

La E-movado en Gliwice ago-tagis kadre de la 1-a Forumo de la 60 neregistaraj organizaĵoj funkciaj en tiu urbo. Pli ol cent personoj venis al la tabloj de Pola E-Asocio, kie deĵoris lokaj e-istoj kaj PEA-estranaroj. Kelkaj interesatoj decidis partopreni E-kurson. La tutan tagon videblis *Mazi en Gondolando* kaj aliaj E-filmoj. Oni intencas dum la 2-a forumo, en majo, prezenti Esperanton al pli vasta publiko. (Stanisław Mandrak)

Rumanio

En Oradea, en la semajnfina (3-4 okt.) numero de la hungarlingva taggazeto *Bihari Napló*, aperis tutpaĝa artikolaro pri la monda kaj la loka (100-jara) E-movado, eĉ kun E-lingva krucvortenigmo. (István Budaházy)

En la vilaĝo Praid dum "festivalo de la farĉita brasiko", Lenke Szász eksponis turismajn prospektojn diverslandajn. La 4-an de okt. ŝi ekinstruis, ĉiam en dimanĉaj posttagmezoj, grupeton da diversaĝuloj. (L. Szász)

Rusio

Moskvaj esperantistoj dissendis al ĉiuj deputitoj de la tutlanda kaj urba parlamentoj alvokon enkonduki Esperanton kiel instruobjekton en universitatojn kaj lernejojn. Ĉi-okaza gazetara komunikado elvokis intereson

ĉe kelkaj amaskomunikiloj: Rusia Televido en sia matena programo 15-minute intervjuis la E-poeton Oĉjo Dadaev. La Moskva E-klubo Lev Tolstoj organizis kunvenon por ĉiuj interesatoj kun koncerto de E-kantoj kaj ekspozicio de E-libroj. (Nikolao Gudskov)

Svislando

Sep membroj de Lucerna E-Societo (LES) deĵoris sep horojn, ĉiam minimume triope, sur centra placo de Lucerno. La preterpasantoj ili invitis al konkurseto, kun semajnfina enkonduka E-kurso kiel unua premio. Haltis ĉe la tendoforma budo ankaŭ turistoj,

plejparte alilingvaj, kiuj povis esti informitaj propralingve aŭ ricevis kontakt-adreson el la Jarlibro. Samtage tri membrinoj de LES realigis surstratan enketon laŭ gvidlinioj de la estraro de Svisa E-Societo. Rimarkinde, Esperanto montriĝis apenaŭ konata inter la junaj demanditoj. (Paul Scherer, Sonja Brun)

Ukrainio

Sur la ĉefa placo de Kievo deko da e-istoj — membroj de la urba klubo Ora Pordego kaj liceanoj — disdonis informfoliojn. Unu el la reklamiloj trafis en la manojn de ĵurnalistoj el la privata televid-studio "Nova kanalo". Rezulte, jam la sekvan vesperon, dimanĉe, ili gastis ĉe la Kieva UEA-delegito Mikaelo Lineckij kaj produktis tri-minutan programeron por elsendo lunda. Temis pri dua televida apero de Lineckij, doninta viglan 15-minutan intervjuon jam en aŭgusta matena programo. Intervjuis lin ankaŭ vaste legata ĵurnalo, *Fakty* (19 aŭg.), sub la titolo "Duonmiliardon da dolaroj elspezas EU por tradukistoj. E-istoj proponas ŝpari tiun monon". (M. Lineckij; Ret-Info, SEJM-virt-info)

Usono

La 2-an de okt., vendrede, Rochelle Grossman disdonadis du broŝurojn al ĉiuj enirantoj de UN-konstruaĵo. (Rochelle Grossman)

Verkado iĝis dolĉa narkotaĵo

Esperanta romano naskis anglalingvan, kiu ĵus aperis en Britio: pli ol sufiĉa kialo intervjui la aŭtoron, Trevor Steele.

Via originala romano Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen eldoniĝis en 1994 ĉe Pro Esperanto en Vieno. Kvar jarojn poste Minerva Press en Londono aperigis ĝian trioble pli dikan anglalingvan varianton, No Butterflies in Bergen-Belsen. Kiel tio okazis?

En 1993 mi planis tramarŝi Aŭstralion, sed subite mi ricevis la ideon verki la romaneton kiu estas nun nekonata sub la titolo *Apenaŭ papilioj*. . . Mi tajpis freneze, finis en 16 tagoj, ne estis tempo por revizii. Mi sendis al Viena amiko — eldonisto Herbert Mayer — la tekston kaj ekmarŝis sur la senfinajn ebenaĵojn de centra Aŭstralio. Izolite de la mondo dum monatoj, mi tamen ekdubis pri la taŭgeco de la verko. Atinginte la urbon Darwin, mi skribis al Herbert kaj petis lin haltigi la laboron pri la teksto. (Mia emo reverki pli ol unu fojon turmentis lin.) Li respondis ke ĉio estas prespreta kaj estus multekoste kaj penige ŝanĝi la tekston. Mi do konsentis, sed decidis draste restrukturi la materialon kaj provi eldonigi ĝin en la angla.

Ĉu iam aperos ankaŭ la nova, ampleksa Papilioj. . . en Esperanto?

Eble. Sed tiun materialon mi sentas nun eksa, mi prilaboras novan.

Vi aĝas nur du jarojn pli ol la heroo de Papilioj, Mark Bryant, kaj ankaŭ vi pasigis tempon junaĝe en Germanio. . . Kiom en ĉi tiu libro fontas el propraj travivaĵoj?

Preskaŭ ĉio. Eĉ Lady Carolynne Beauchamp, kiu eble ŝajnas karikaturo, ekzistis. La eventoj en la vivo de tiuj eksmalliberuloj baziĝas sur faktoj. Sed la



Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen kaj No Butterflies in Bergen-Belsen: Post Esperantujo, la romano ekflugas ankaŭ en la anglalingva beletra mondo.

am(or)spertoj de Mark estis pli interesaj ol la miaj — kaj pli turmentaj.

Kiuj estas laŭ via sperto la diferencoj inter verkado en E-o kaj en la angla?

Verkante mian romanon *Sed nur fragmento*, mi ambiciis prezenti larĝan vizion de la historio kaj intelektaj fluoj de tiu epoko. Mi konsciis ke tion legos e-istoj en ĉiuj kontinentoj, do mi celis maksimuman klarecon; eĉ ekzemple krokizante la regulojn de kriketo, por ke alikulturuloj iom komprenu. En anglalingva versio tia pedagogia celo ne taŭgus. Sed mi konfesu ke en la multe pli limigita, privata mondo de *Apenaŭ papilioj*. . . mi malofte konsciis diferencojn kaŭzitajn de la diversaj verklingvoj.

Kion vi verkas nuntempe?

Jam du jarojn mi luktas kun romano tre ampleksa, kiu celas portreti

tri generaciojn de aŭstralia familio. Eble la materialo estas troa, kaj min atakas duboj pri la rakontmaniero.

Kie, kiel vi vivas?

Aktuale mi instruas Esperanton en Litovio. Mirinda landeto. En Vilnius aperis 220 komencontoj: ni devis persvadi 60-70 el ili atendi la postan kurson. Tiaj nombroj ne estas unikaj en Litovio — sed *estus* aliloke, ĉu ne?

Kiom gravas verkisteco en via vivo?

Verkado iĝis por mi dolĉa narkotaĵo. Se mi ne verkas, iu voĉo urĝas min ne perdi tempon. Esperanto estas unu el la aferoj kiuj donas celon al mia vivo, kaj verki en la lingvo de la iama estontaĵo estas por mi memkompreneble.


Kion vi pensas pri la kandidatigo de William Auld por la Nobel-premio?

Mi ĝojus se Bill Auld, kies talenton nur ni konas, iĝus mondfama. Sed ricevo de tia premio ne estas afero nur de talento, ĝi estas politikaĵo. Ke Bill gajnos, ni ne revu, sed ni esperu ke la kampanjo vekos intereson pri nia lingvo. ★

Trevor Steele

- 1940 Naskiĝo
- 1958-60 Studanto en katolika seminario en Brisbano, Aŭstralio
- 1961-67 Studado (ĉefe de la germana kaj historio) kaj instruado
- 1967-71 Laboro en Germanio, Anglio kaj Hispanio
- 1972-76 Instrukado en Aŭstralio
- 1977 Volontula laboro en Bona Espero, Brazilo
- 1978-89 Instrukado en Aŭstralio
- 1987 *Sed nur fragmento*, romano
- 1990-92 Laboro en Sovetio, Polio, Germanio
- 1992 *Memori kaj forgesi*, noveloj
- 1993-94 Marŝo tra Aŭstralio, laboro en aborigena rezervejo
- 1994 *Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen*, romano
- 1995 Laboro en Bona Espero kaj Germanio
- Remember and Forget*, noveloj
- 1996 Instrukado de E-o en Montessori-lernejoj en Perto, Aŭstralio
- 1997 Instrukado ĉe somera lernejo en Sanfrancisko, Usono, poste en Bydgoszcz, Polio
- Falantaj muroj, vojaĝrakontoj*
- 1998 Instrukado de Esperanto en Litovio
- No Butterflies in Bergen-Belsen*, romano


Recenzoj



Kunportinda al diskutoj

Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. 21cm. 24,00 gld. Triona rabato ekde tri ekz.

Ĉi tiu libro neniel gajigos la legantojn: en stilo tre afereca, la tuta gamo da problemoj, konfliktoj, kontraŭecoj de la 20-a jarcento sur nia planedo pasas antaŭ niaj okuloj. Sed ĝi estas ege leginda kaj, fakte, *studinda* libro: ĉar ja kiu — krom fakulo pri internacia juro — havas ankoraŭ iom kompletan superrigardon pri tiu tereno? Kiu trovas la vojon inter ĉiaj Deklaracioj, Ĉartoj, Konvencioj kaj Rekomendoj?



Ilustraĵo de Plantu el *Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj*

Se doni ekzemplon: ĉu vi konas la Komisionon pri Homaj Rajtoj? Ja

multterene ĝi tre aktivas. “Laŭgrade kaj en porokaza maniero disvolviĝas gamo da kontrolaj meĥanismoj, kies valideco ne devenas de specifa instrumento de homaj rajtoj. Ili estas establitaj, ĉiu kun propra specifa mandato, per rezolucioj de la Komisiono, aprobe de la Ekonomia kaj Socia Konsilio” (p. 53).

La verko konsistas el du partoj: en la unua, “Internacia juro pri homaj rajtoj”, oni trovas 87 parojn da demandoj kaj respondoj, kiuj donas ege

trafan kaj klaran bildon pri la temoj kaj pri la provoj je solvo: kiujn deklaraĵojn, ĉartojn ktp oni adoptis. Tre utile por ĉiu kiu nur svaĝe interesiĝas pri nia homaro: ĉe ĉiu iom grava teksto piednoto listigas la ŝtatojn kiuj aprobis, subskribis aŭ ratifis ĝin. Tiel do, ekzemple, eblas kontroli ĉu tiuj ŝtatoj kiuj kutime tre laŭtas pri alies homaj rajtoj, mem almenaŭ subskribis la koncernajn

konvenciojn. En eventualaj diskutoj pri parencaj temoj estas senchave kunporti la libron.

La dua parto klare kaj resume traktas ĉiun unuopan artikolon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, indikante kiel nunaj internaci-juraj specialistoj kaj instancoj komprenas la terminojn. Ankaŭ tie multe eblas lerni, ekz. pri artikolo 3 (koncerne la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco): “Kio okazas, se la leĝoj de Ŝtato permesas la ĉesigon de homa vivo per mortpuno?” (p. 88); “Ĉu ekzistas internaciaj instrumentoj celitaj al abolicio de la mortpuno?” (p. 89)

Sed se diri sincere, apenaŭ havas sencon plu doni ekzemplojn unuopajn: la *tuton* oni legu kaj studu. Kaj, iom adaptante mezepokan maksimumon koncerne la studadon de la Biblio: “dediĉu vin tutan al la afero...” La Homaj Rajtoj ja estas *nia* tuthomara afero.

Eta kritiko aŭ, pli ĝuste, bedaŭreto: kial librofino mankas listo de mallongigoj?

Entute: riĉigo de nia libraro — kaj vaste uzinda!

Gerrit Berveling

Kiel infanoj regis

Interparolo en la frukt-gardeno la 5-an de aŭgusto (1978). Igor Newerly (1903-87). El la pola trad. Zofia Banet-Fornalowa. Varsovio: la trad., 1997. 67p. 20cm. 10,50 gld.

Jen dokumento en beletra vesto pri la respubliko de infanoj kiun la granda pola pedagogo Janusz Korczak gvidis dum tri jardekoj en Varsovia orfohejmo ĝis sia perejo, kune kun la infanoj, en la koncentrejo Treblinka la 5-an aŭgusto 1942.

Fakte, tiun respublikon gvidis la infanoj mem: nekredeble sukcesa pedagogia kaj demokratia eksperimento. La infanoj havis proprajn parlamenton, tribunalon kaj gazeton. Ili decidis ne nur pri siaj aferoj sed eĉ pri tiuj de la edukistoj, kiuj ne konsistigis privilegian grupon en la respubliko. Male al la perforto inter la fikciaj infanoj de *La sinjoro de la muŝoj* de W. Golding,

la vivo en la reala orfa respubliko baziĝis sur pacaj reguloj, toleremo kaj reciproka estimo. Ĝiaj leĝoj praktike ne konis punojn sed nur pardonojn, ĉar ili celis vekti la kulpinton konscii pri sia eraro kaj pliboniĝi.

Eĉ Esperanto havis lokon en la orfejo: al la 18-a de majo, kiu estis — laŭ instigo de Ligo de Nacioj — Tago de Bonvolo, la infanoj omaĝis per aperigo de sia *Malgranda Revuo* en la pola kaj Esperanto, kun leteroj de infanoj el la tuta mondo. Korczak, same kiel Newerly, estis amiko de Esperanto. Jam en 1927 oni povis legi de li *Bonhumoraj rakontoj* en E-eldono.

En nia tempo, kiam milionoj da infanoj malsatas, malsanas, ne povas viziti lernejon aŭ pelate sklav-laboras, prostituigas kaj eĉ soldatas, estas bone legi pri la ekzemplo kreita de Korczak. Dankon al Banet-Fornalowa, kiu malkovris por ni tiun ĉi bonegan verkon pri homaj rajtoj kaj packulturo.

Osmo Buller

Al demokrata alternativo

En la lingvistika konferenco "Kiu lingvoj por Eŭropo?" (Oegstgeest, Nederlando, 9-11 okt.), Esperanto aperis kiel alternativo serioze konsiderinda por Eŭropa Unio (EU).

Sub organizo de Eŭropa Kultura Fondaĵo kun Eŭropa Parlamento (EP) kaj la kulturministerio de Luksemburgio, konferencis elstaraj lingvistoj kaj socisciencistoj, reprezentantoj de EP kaj de Konsilio de Eŭropo kaj kelkaj observantoj ekster-eŭropaj. Okazis kvar sesioj:

La Eŭropa situacio de lingvoj. Abram de Swaan, nederlanda sociologo, prezentis sian teorion pri "politika sociologio de la monda lingvosistemo". La kimra lingvo-geografo Colin Williams kaj la kataluna psikolingvisto Miguel Siguán parolis pri la rilatoj lingvo – nacieco, precipe el la perspektivo de la t.n. regionaj lingvoj, kiel la kimra aŭ la okcitana. Ĉi tiujn prelegojn komentis i.a. Robert Phillipson, kiu instigis al pli serioza pristudo de la strukturo de la E-movado, ĉar laŭ lia sperto tio povus esti tre instrua.

Lingvoj en civita Eŭropo. Parolis Wolfgang Mackiewicz kaj Ingrid Gogolin, germanaj socilingvistoj, kaj ilia nederlanda kolego Guus Extra, ĉefe pri la demando kiujn lingvojn lernu la

eŭropaj infanoj en la lernejo. Mackiewicz klarigis la politikon de EU: ĉiu civitano lernu almenaŭ du el ties oficialaj lingvoj, krom tiu de sia lando. Gogolin kaj Extra montris ke la situacio estas multe pli komplika, ĉefe pro



El la helpaĵo de Robert Phillipson

Pristudi la E-movadon povus esti tre instrue — opinias Robert Phillipson.

la aro da "neindigenaj" lingvoj nun parolataj en Eŭropo. En siaj komentoj Marc van Oostendorp enkondukis la terminon *ius potestis*: la povohavanto decidas pri la uzenda lingvo. Tial eŭropanoj insistas ke la "indigenaj, oficialaj" lingvoj estas lernendaj por ĉiuj

civitanoj en Eŭropo, kaj la "regionaj" kaj "ne-indigenaj" lingvoj havas malpli da rajtoj. Li proponis pristudi pli demokratiajn alternativojn, ĉefe E-on.

Lingvoj en politika Eŭropo. Marc Abeles, franca antropologo, raportis pri siaj esploroj en EP, kun anekdotoj pri vortludoj tradukataj kiel "bv. ridi por ne aspekti stulte". La franca politikologo Virginie Mamadouh revuis la eblajn solvojn: unu natura lingvo por ĉiuj, unu artefarita lingvo por ĉiuj, pluraj naturaj lingvoj ktp. E-on ŝi opinias principe enkondukebla, sed nur per "projekto kun granda mobiliza forto", apenaŭ imagebla en la nuna EU.

Al nova lingvopolitiko por Eŭropo. Amitav Choudry, socilingvisto, donis superrigardon pri la situacio en sia lando, Barato. La nederlanda politikologo John Grin prezentis manieron decidi pri la eŭropa lingvopolitiko; li avertis ke proponoj rezultantaj sole el racia analizo riskas fiaski pro spontana kontraŭstaro, des pli kiam temas pri "nenies lingvo, la latina aŭ E-o". Inter la komentarioj estis la sudafrika socilingvisto Neville Alexander: ankaŭ li emfazis ke ni pli serioze konsideru la alternativon Esperanto.

La partoprenantoj de la inspira konferenco estis neortodokse malfermaj al ĉiuj solvoj — kion montris ankaŭ la pridiskuto de E-o. Venontan aprilon okazos dua konferenco samtema.

Marc van Oostendorp (Nederlando)



• Ĉolev 95-jara

La 95-jariĝa jubileo de Manol Ĉolev, celebrita la 27-an de sept. en Velingrad (Bulgario), fariĝis kortuŝa festo de tuta urbo. Instruisto, turisto, esperantisto, kooperativa aktivulo, Ĉolev ankaŭ longtempe servis kiel UEA-delegito pri turismo kaj paco. (*Bulgara E-isto*)

UK Ĝis la 25-a de nov. al la Berlina UK (31 jul.-7 aŭg. 1999) aliĝis 1325 personoj el 53 landoj.

• Gaines: Doktoriga simfonio

Ni raportis en la pasinta jaro (jan. '97, p. 19) ke David Gaines, delegito pri muziko, komponas la unuan Esperanto-simfonion, "Simfonio n-ro 1 por mezsoprana voĉo kaj orkestro". En majo ĉi-jare Gaines doktoriĝis ĉe la komponada fakultato de la Baltimora Muzika Konservatorio Peabody per tiu simfonio, kies tekstoj venas de Marjorie Boulton, Penka Papazova, Zamenhof kaj Gaines mem. La komponisto nun serĉas interesatojn por la



David Gaines

Komprene de David Gaines

unua publika prezento de la verko: 9879 Boca Gardens Trail, Apt. B, Boca Raton FL 33496, Usono; davegaines@aol.com.

• Nanovfszky: Duobla distingo

La 31-an de oktobro en la Budapeŝta E-Domo okazis, krom beletra aranĝo (vd. nov., p. 198) ankaŭ festo gratule al la nova prezidanto de Hungaria E-Asocio, d-ro György Nanovfszky, kiu ĝis aŭgusto servis kiel longtempa ambasadoro de Hungario en Moskvo. Nanovfszky ĵus ricevis ne nur la memormedalon Imre Nagy, pro siaj atingoj kiel scienca esploristo, sed ankaŭ la Ofician Krucon Respublikan, kiu estas la tria plej grava ŝtata distingo en Hungario. (L. Szilvási)



Kun viaj kontribuoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi fotas aŭ disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Freŝdataj portretoj de aktivaj esperantistoj estas aparte bonvenaj. Koran dankon!

Laste aperis



Barkoj el akvo. *Elektitaj kroataj noveloj 1970-1995.* Elektis Julijana Matanović. Red. Ivan Špoljarec. El la kroata trad. diversaj. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1998. 245p. ISBN 953 96010 8 8. 20cm. 22 noveloj, kaj eĉ unu suplementa el 1997. 22,50 gld.

Ekzercoj al la Tuta Pasporto. *Skribaj kaj paroligaj ekzercoj por lernantoj de la videokurso Esperanto – Pasporto al la tuta mondo* (vd. sube). Stefan MacGill (1948). Ilustris Gejl Lucas. Budapeŝto: ELNA/ILEI, 1998. 62p. 30cm. 7,80 gld.

Eraro. Stig Jacobson (1913). Skövde: Alfab-et-o, 1998. 52p. ISBN 91 973467 1 3. 21cm. Ilus. Kurt Frisk. Dek originalaj noveloj de sveda aŭtoro. 10,50 gld.

Eta konversacilibro rumana – Esperanta – franca – germana. Red. Prof. Dr. I.F. Bociort (1924). Timișoara: Imprimeria Miron, 1998. 113p. 21cm. Kolekto de utilaj frazoj kaj esprimoj. 9,00 gld.

Franca antologio 1-6. Red. Hervé Gonin. Trad. R. Bernard, P. Combet, H. Gonin, G. Lagrange, J. Vincent, G. Waringhien k.m.a. Antaŭparoloj de R. Bernard, J. Le Puil kaj I. Ertl. Paris: UFE, 1998. 488 + 416 + 468 + 340 + 404 + 276 (= entute 2392) p. 21cm. 6 volumoj. Resuma eldono de la 43 literaturaj kromnumeroj de *Franca Esperantisto*: prozaĵoj kaj teatraĵoj de la 16-a ĝis la 20-a jarcento. 120,00 gld.

lu finna infanaĝo. Erkki Rasku (1922). Tampere: la aŭtoro, 1995 (2-a eld.). 14p. 21cm. Ilus. Ses rakontoj pri "hejma kaj vilaĝa vivo post la unua mondmilito". 3,00 gld.

Kunularo de l' Ringo, La. *La unua parto de "La mastro de l' ringoj"* (1954). John R. R. Tolkien (1892-1973). El la angla trad.



William Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1997 (2-a, plibonigita eld.). 543p. 20cm. Bind. Epopeeca rakontego pri imagita mondo: la heroo devas detrui magian ringon, kies ekzisto minacas la tutan mondon. 48,00 gld.

Pli ol kvindek. *Tradukoj el diversaj lingvoj, plejparte kanteblaj.* Trad. Adolf Burkhardt. Villingen: Bernhard Eichkorn, 1998. 56p. 21cm. Kantotekstoj. 7,80 gld.

Promeso en obskuro. *Noveloj.* Manuel de Seabra (1932). Viena: IEM, 1997. 110p. ISBN 3 901752 07 2. 23cm. Historioj pri amo aĉetebla kaj ties implikoj sociaj kaj ekonomiaj. 22,50 gld.

Tero kaj ĉielo kantu. *Partoj VIII-X.* Adolf Burkhardt (1929). Villingen: pastro Eichkorn, 1998. 76p. 30cm. 73 religiaj kantoj kun muziknotoj. 9,90 gld.

Tio konvenas! (1839). Carl J. L. Almqvist (1793-1866). El la sveda trad. Sten Johansson. Skövde: Alfab-et-o, 1998. 80p. ISBN 91 973467 0 5. 21cm. Romaneto pri "vojaĝo kaj

Por legi kaj por aŭskulti dum la jarfinaj ferioj...

iom-post-ioma interkonatiĝo de Sara kaj Albert dum somera semajno", pamfleta atako al la fundamentoj de la sveda socio. 12,60 gld.

Vagabonde. *Poemaro.* Petro Braŭn (1957). Edinburg, TX: la aŭtoro, 1998. 64p. 21cm. Poemoj inspiritaj de vojaĝoj meksikaj, hispanaj, usonaj. 13,20 gld.

KOMPAKTA DISKO

Alberta Casey kantas tridek kantojn en Esperanto! *Estu sur tero pac'.* Berta Records, 1998. 66 min. Furorkantoj senvelkaj, de "Kisu min multe" ĝis "Kredis mi" (*Yesterday*). Piana kaj gitara akompano. 33,00 gld.

VIDBENDO

Esperanto – Pasporto al la tuta mondo. Paul Gubbins (1949), Edwin Grobe. El Cerrito: E-Ligo por Norda Ameriko, 1998. 120 min. La unuaj 4 eroj de 15-leciona kurso pri la Esperantaj lingvo kaj kulturo. Filmita de profesiuloj. Kun tekstokajero. 174,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Foli-ume



• Tradukoj el Esperanto

La origine E-lingva filozofia verko *La nova realismo* de Bruno Vogelmann aperis, kiel 20-a traduko, en hispanigo de Aurelio Solis y Pi kaj F.J. Dávila Dorta.

La libro *Eŭropa ideologio* de Zlatko Tišljar aperis en slovenigo de Vinko Ošlak ĉe Inter-kulturo, kun subvencio de Fondaĵo Soros. Post prezento de la libro la 22-an de okt., informis pri ĝi naciaj gazetoj kaj multaj radiostacioj de la urbo Maribor, i.a. per 15-minuta intervjuo kun la aŭtoro. Eseo kiu nun formas parton de la libro ricevis trian premion en Belartaj Konkursoj de UEA (vd. okt., p. 173, 179).

Asocio por Eŭropa Konscio (p/a Zlatko Tišljar, SI-2000 Maribor, Besednjakova 1, Slovenio; ☎/☎+386/62/100-669) planas aperigon de la libro ankaŭ angle kaj germane. (K. Nekrep, Ret-Info)

• Radikoj Zamenhofaj

"La vivo-verko de L.L. Zamenhof", 18-paĝa, ruslingva eseo de Igorj Simonov, aperinta en la revuo *Korni* ("Radikoj", 600 ekz.) de la Popol-Universitato pri Juda Kulturo por Centra Ruslando kaj Volgio, traktas la cionismajn kaj homaranismajn aspektojn de la spirita heredaĵo de Zamenhof. (*La Ondo de E-o*)

• Konkize-redaktoro serĉata

Marko Naoki Lins (Gemarkenstr. 150, DE-51069 Köln, Germanio; ☎+49/221/680-32-50; ☎686-742; ✉konkize@esperanto.de) ĉesos redakti la eŭropan junularan bultenon *Konkize* kaj serĉas posteul(in)on ekde la n-ro 2/99, kies redaktifino estos meze de februaro.

Nekrologoj

Maria BOLCATO (1906-1998), aktivulino, iama delegito pri instruado en Mantovo (Italio), mortis la 20-an de septembro.

Walter BOPPRÉ (1926-1998), 50 jarojn e-isto, kungvidinta la E-asocion en la brazila ŝtato Santa Catarina, mortis la 25-an de septembro en Florianópolis.

Lucila DÁVALOS FERNANDES (1924-1998) forpasis la 12-an de oktobro en Porto Alegre, kie ŝi estis vicdelegito pli ol du jardekojn. Kiel estrarano de E-organizaĵoj en suda Brazilo, ŝi stimulis la kreon de E-nukleoj plurloke en la ŝtato Rio Grande do Sul.

EUN Mouam (1907-1998), koreo vivinta en Japanio ekde 1924, aktiva en la japana proleta E-movado, forpasis la 17-an de majo en Tokorozawa.

Augusto GARCÍA BREQUE (1914-1998) forpasis la 1-an de aŭgusto en Bonaero (Argentino). E-isto de la jaroj 50-aj, li instruis la lingvon ekde 1962 kaj agadis kiel estrarano de Argentina E-Movado. Sian personan E-bibliotekon li donacis al bezonanta E-asocio.

Vladimir IZOSIMOV (1947-1998), tradukanto, preleganto, instruanto, ĉefa organizinto de la Ruslanda E-ista Kongreso en 1995, mortis la 23-an de oktobro en Tjumenj, du tagojn antaŭ la 25-jariĝo de la urba E-klubo Revo, kiun li gvidis dum multaj jaroj.

Edgar JOBIN (1949-1998), iama delegito pri fotografio kaj ornitologio en Le Locle (Svislando), forpasis la 12-an de oktobro.

Willy KEIZER (1917-1998), ofta partoprenantino de UK-oj, fidela membro de Societo Zamenhof, mortis la 22-an de oktobro en Heemstede (Nederlando).

René LEMAIRE (1900-1998), la plej aĝa dumviva membro de UEA, mortis la 21-an de oktobro en Liono (Francio). Lerninte Esperanton de Lidja Zamenhof en 1933, li longtempe servis kiel sekretario de la Liona klubo kaj de la Federacio Rodanropa.

Emerich MANNER (Mirko Mamužić, 1928-1998), forpasis la 31-an de aŭgusto en Nussbaumen (Svislando). Aktiva diversfunkcie en la Zagreba klubo Bude Borjan, li ankaŭ instruis, prezidis la lingvan komisionon unue

→

Karl Söderberg (1903-1998)

Karl Söderberg, Honora Membro de UEA (ekde 1991) kaj de Sveda E-Federacio, mortis la 19-an de oktobro en Upsalo.

Li naskiĝis la 6-an de januaro 1903 en Smedjebacken. Dum siaj universitataj studoj en Upsalo li prezidis studentan organizaĵon. En 1929 prelego de Henrik Seppik ekinteresis lin pri Esperanto: sekve, li ekaktivis en E-Societo de Upsalo, jam en 1930 kiel vicprezidanto. (En 1981 ĉe la sama societo aperis lia broŝuro *La E-movado en Uppsala*). Ekde 1934 li zorgis pri E-kursoj kaj aliaj Esperantaj programoj de la Sveda Radio (1934-35, 1949-52) kaj samjare eniris la estraron de Sveda



Arkivo de UEA

Esperanto-Instituto, funkcionte kiel prezidanto de 1939 ĝis 1972.

Laborante kiel instruisto (1930-45), rektoro (1945-58) kaj direktoro super ĉiuj lernejoj en Upsalo (1958-69), li tre aktivis politike. Li estis en Upsalo membro, vicprezidanto, fine prezidanto

de la urba deputitaro, aktiva en multaj urbaj kaj kelkaj ŝtataj komisionoj. Li atingis ke la sveda registaro regule deleĝu reprezentanton al la Universalaj Kongresoj: 16-foje li mem salutis nome de sia registaro.

Kiel politikisto li ĉiam trovis tempon por E-o, eĉ kiel akademiano (1953-83) kaj kiel komitatano de UEA (1956-77), en kiu li membris de 1942. Li servis 50 jarojn kiel delegito pri instruado. Rektoro de tri sesioj de Internacia Somera Universitato, kvarfoje li mem prelegis en ili.

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Germanio: Axel F. Knapp. Japanio: KIMURA Eizi.

SOCIETO ZAMENHOF 1998

Brazilo: Álvaro Rabêlo. Britio: E.R. Waterworth.

DONACOJ 1998 (NLG)

ĝis la 31-a de oktobro

Asocia Kapitalo: Nederlando: heredaĵo W. A. Verloren van Themaat 325 000,00. Sumo ĉi-jara: 397 531,20.

Fondaĵo Afriko: Finnlando: anonime 250,00. Italio: D. Trombetta 2405,25. Svislando: La Stelo 135,97. Sumo ĉi-jara: 26 230,75.

Fondaĵo Ameriko: Finnlando: anonime 250,00. Sumo ĉi-jara: 4956,50.

Fondaĵo Canuto: Aŭstralio: T.M. Metherall 10,00.

Belgio: H. Rau 10,00. Finnlando: H. Kesälä 20,00. Germanio: G. Macioszek 224,00. Italio: D. Masterman 9,45. Nederlando: H. ten Hagen 32,00. Hispanio: S. Miquel Planas 12,00. Venezuelo: J.E. Bachrich 100,00. Sumo ĉi-jara: 9172,57.

Konto Espero: Finnlando: anonime 250,00. Israelo: nome de M. Ben-Porat 100,00. Nederlando: Faulhaber-semajnfino 401,09. Sumo ĉi-jara: 1323,57.

Junulara Fondaĵo: Germanio: R.Plüger: donaco al Pasporta Servo. 30,00. Sumo ĉi-jara: 2415,57.

